

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

N-o 47, 28. aug. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

Nederlanda Gastameco.

**Karavano de malfortaj saksaj infanoj al nederlandaj esperantistoj.
Sunradiaj tagoj en Budapest.**

Partopreninte la XIII-an Universalan Kongreson de Esperanto, s-o seminaria direktoro J. W. Sevenhulsen el Haarlem, reprezentanto de la Nederlanda Ministro por Instruo, Artoj kaj Sciencoj, vojaĝis kun sia filino fra Vogflando (Saksujo) kaj vizitis Chemnitz kaj Auerbach. En la unua urbo reprezentanto de la urbestro akceptis lin afable kaj donis al li okazon viziti la faman Blindul-Instituton, la Arbar-Lernejon kaj diversajn aliajn lernejojn. En Auerbach, kie li restis kelkajn tagojn por aranĝi kun s-o H. Gerisch la esperantan karavanon de malfortaj germanaj infanoj al Nederlando, li estis akceptata de d-ro Puchta, anstataŭanto de l' urbestro, de registara konsilisto d-ro Schwerdtner en la nomo de l' distriktestro, kaj de multaj instruistoj kaj profesoroj.

Detalan raporton pri la akcepto en Auerbach bv. legi sur la dua paĝo.

La postkongresa festo de la hungaroj.

Pri la postkongresaj tagoj en Budapest ni ricevis sekvantan raporton:

Laŭ ĝenerala opinio la germanoj estas la plej lertaj organizantoj. Tamen, ni nun devas konfesi, ke ion bele, eĉ bonege aranĝi ankaŭ povas la hungaroj. Ĉar en illa aranĝado estas io plia ol pura organizo, io kio kapablas anstataŭi mankojn de organizo: vasta koro, varma ekflamo, sincera gastameco kaj brilanta entuziasmo. Ĝuste tiuj ĉi ecoj kelkfoje povas eble estingiĝi kaj laŭ pafila maniero eĉ nenigi la organizon; sed se ili daŭras, ili kreas miraklojn.

Tia surpriza miraklo estis la postkongresa festo en Budapest. La antaŭsciigoj estis timigaj, oni ja parolis pri nepermeso de la esperantista kongreso. La vojaĝo estis aventura. Multaj samideanoj timis partopreni, kaj la sepdek partoprenantoj forlasis Praha'n kun malagrablaj antaŭsentoj pro malbonaj spertoj ĉe la preskaŭ tro grandnombra kongresego, kies miloj ne povis sufiĉe varmigi kaj entuziasmigi unu la alian.

Jam en Bratislava, post tutnokta vojaĝo, atendis malagraba surprizo: neniu aranĝo, neniu zorgis pri loĝado, kvankam oni certigis nin, ke ĉio estas prizorgita. Fine jam aŭdiĝis revoluciaj sonoj. Kelkaj samideanoj volis disigi la karavanon kaj tuj pluen vojaĝi per vagonaro al Vieno aŭ al Budapeŝt. En decida momento laŭ petoj de kelkaj fervoruloj s-ano Stettler transprenis la komandon. Li iris kun bratislava samideano Vanitsek kaj kun s-oj Setälä kaj Balkanyi al la loĝoficejo, kaj fine ni ĉiuj havis, se ne tre komfortan, tamen puran liton en lernejoj.

Multaj dormis bonege, kaj la karavano ekvojaĝis la 8-an matene per la bela, moderna ŝipo „Budapest“ sur la Danubo, por ĝui unu agrablan tagon ĝis malfrua vespera horo sur la akvo.

La hungara kapitano de la ŝipo estis tuj tre afabla, kaj la ŝipo baldaŭ antaŭeniris en la mezon de Hungarlando, sub flirtantaj verdstelaj standardoj, kiuj estis sur la pinto, ambaŭflanke kaj ĉe la malantaŭa fino.

La ŝipo estis plena je vigla esperanta babilado. Oni promenis, manĝis, iradis, kvazaŭ en unuaranga hotelo, kaj la hungaraj samideanoj, ges-oj Tolnai, s-anoj Balkanyi, Laquer kaj la aliaj faris ĉion eblan por agrablighi la restadon.

La valizojn la limdepagaĵ oficistoj eĉ ne malfermis, la pasportoj estis stampataj aparte, kaj en Vacz, la lasta stacio antaŭ Budapeŝt, venis s-ano Mateffy kun la programoj kaj kun la hotelkartoj por la fremduloj. Sur kelkaj valizoj estis aranĝata „akceptejo“, afiŝoj estis elpendigataj, kaj ĝis Budapeŝt post ŝvitiga laboro ĉiuj partoprenantoj ricevis hotelkarton, programon, planon de Budapeŝt kaj necesajn informojn.

Dume la ŝipo majeste antaŭeniris inter la fee lumigitaj bordoj de la hungara ĉefurbo, la grandegaj konstruaĵoj siluetiĝis en nokta malhelo. Brillis la akvo, kaj ekbrillis ĉiuj okuloj, kiam ili vidis sur

la bordo pli ol cent samideanojn starantajn laŭlonge de la vojo kaj salutantajn la fremdajn gastojn. Staris tie la prezidanto de la landa asocio, d-ro Giesswein, vicprezidantoj Patai kaj Racz kaj multaj laboristoj.

Junuloj kun tabuletoj de la hoteloj atendis tie, kaj tiamaniere ĉiu gasto trovis sian kondukanton, kiu kondukis lin ne nur al la hotelo por li destinita, sed ankaŭ la alian tagon al la nova urbdomo.

La 9-an de aŭgusto (marde) matene sur la nova urbdomo flirtis majesta ruĝ-blank-verda nacia flago kaj simile granda verdstela standardo.

La estradon okupis sub esperanta girlando la prezidanto de la organiza komitato kaj la subprezidanto de la landa societo: d-ro Bela de Racz kaj polikapitano Paŭlo de Bela.

D-ro Racz malfermis la kunsidon je la 11-a salutante la alvenintojn kaj transdonante la vorton al s-ano Julio Baghy, kiu per entuziasmiga parolado bonvenigis la gastojn. Liajn lastajn vortojn englutis tondra aplaŭdo.

Reprezentantoj de dekdu nacioj salutis la hungarajn samideanojn: s-ano Paul Blaise por la angloj kaj por UEA, s-ano Hudson el Aŭstralio, f-ino Margareto de Rycke por la belgoj, s-ano Blicher por la danoj, s-o Vilho Setälä por la finnoj, s-o Marcel Boubou por la francoj, d-ro Hinsenkamp por la germanoj, s-ro Joan Gili Norte por la hispanoj kaj katalunoj, s-ino Bramkamp por la nederlandanoj, s-o kavaliro Attilio Vaona por la italoj, s-o Helsing por la svedoj kaj s-o William Perrenoud por la svisoj. Iliaj paroloj estis emociaj, kelkfoje kortuŝaj, montris varman simpaton al la hungara nacio kaj ĝia sorto kaj estis fortege aplaŭdataj.

D-ro Racz dankis la salutvortojn kaj alvokis s-on Balkanyi sciigi la programon.

La belan kunsidon oni finis per ravantaj deklamoj de d-ro Kolomano de Kalocsay kaj de Julio Baghy. Iliaj festaj poemoj estis surprize belaj. La hungaroj posedas efektive geniajn poetojn, ili povus pruntedoni el ili al aliaj nacioj.

Post fermaj vortoj de d-ro Racz oni kantis la himnon, kaj la festeno finiĝis.

Post la kunsido la samideanoj disiris, sed je la unua denove kunvenis (proks. cent) en la moderna hotelo „Sankta Gerardo“, sur kies fronto, kiel en Budapeŝt ĉie, kie okazis iu esperanta festo aŭ kunveno dum tiuj du tagoj, majeste flirtis la verda standardo.

Vera festa tagmanĝo okazis tie, kiam s-o Setälä salutis la ĉeestantojn por la fremduloj kaj s-ro Giesswein respondis per elokventa parolado. S-o Stettler parolis pri la impresoj, kiujn li ricevis de Budapeŝt, menciante ne nur la neatendite trovatan lukson kaj belecon, sed ankaŭ la malfeliĉan situacion de la lando kaj de ĝia loĝantaro.

Post la festmanĝo okazis komuna fotografado kaj vizito al la zoologia ĝardeno.

En la urba arbareto estas malgranda somera teatro, modesta, simpla lignokonstruaĵo. Sed ĝi pleniĝis per entuziasmo kaj arto, kiam post la oka vespere alvenis la esperantistoj, kaj s-ano Elinjo Szekely deklamis la prologon de Kalocsay. Tra la teatro sonis la muziko de nia lingvo tiel dum la numeroj de la programo kiel dum la paŭzoj, kiam oni kriis: „Esperanto Triumfonta, plej nova numero!“, malgranda knabo rondiris diradante: „Freŝa akvo! Freŝa akvo!“ kaj la publiko interparolis vigle, bonhumore en nia kara lingvo. Ĉar vere regis vigleco kaj bonhumoro, kiu kreskis de numero al numero kaj pleniĝis per ankaŭ interne varma, vera entuziasmo la korojn kaj animojn, bedaŭrinde ofte mankinta dum la tro amasaj kunvenoj de la Dektria.

La arta fortepian-ludo de s-ano Spiro el Miskolcz, la deklamado de Kalocsay kaj Elinjo Gerő, la kantado de Ivanyi kaj M. Sarosi kondukis nin rekte ĝis revado, precipe kiam la ĉefaranginto

s-ano Baghy ludis kun Sarosi la propran teatraĵeton „Revenuloj“, belan lirikan scenon pri la eterna romantika temo, pri la amo. La poezio estis de Baghy, la kantoj de Sarosi, kaj la ludado de ambaŭ montris veran, delikatan arton, ne ofte troveblan dum esperantaj prezentadoj.

Post paŭzo venis la lasta surprizo. Tripartan, unuaktan komedion de Eŭgeno Heltai kaj Emilo Makai ludis la aktoraro de Baghy: „Paĝo de l' reĝino“. Krom Baghy kaj Sarosi bone ludis Kalocsay kaj la f-inoj M. Toman kaj Ireno Zacssek. Ĉiuj montris aktoran talenton, la aranĝo de Baghy montriĝis tre efika, kaj la publiko ĝuis kun konstanta intereso la belan tradukon de Kalocsay. Tia teatra vespero estis laŭ la opinio de multaj malnovaj kongresvizitintoj ne ofta en la historio de nia movado.

La dua tago de la festagoj jam tro rapide pasis. Antaŭtagmeze la vizitado al la reĝa kastelo kaj rigardo de la urbego, de la bastionoj en la fortiikaĵo, posttagmeze vizitado al la parlamento sub gvido de s-ano Laquer kaj promenado tra la insulo Sankta Margareto estis la ĉefaj programpunktoj.

Vespere en restoracio sur la insulo estis — ho ve, jam — la adiaŭa vespermanĝo komuna. Ŝajne la hungaroj povas aranĝi festenmanĝojn, kaj la proksimume centkvindek ĉeestantoj travivis tie kelkajn vere sunradiajn horojn, kiam la koroj malfermiĝis kaj kiam oni ligis amikecojn por ĉiam.

Meze de la ĉambrego sub la verdstela flago ekstaris d-ro Giesswein, klun ĉiuj ekamis, ĉar oni ekkonis lin kiel veran homon, veran esperantiston starantan super la taga politika vivo, super nindaj intrigoj kaj personaj vantaĵoj. Li kore adiaŭis la allandajn gastojn menciante, ke la naciaj kulturoj estas necesaj, sed same necesega estas la internacia kompreniĝo, ĉar sen ĝi nia eŭropa kulturo pereus.

S-o Blaise adiaŭis de la hungaraj gastigantoj en la nomo de la fremduloj per kortuŝaj vortoj, dankante pro la korega akcepto, la varma gvidado, la samideana helpado kaj la bonega aranĝo. Li promesis raportii pri ĉio hejme kaj esperas, ke baldaŭ li povos revidi Budapeŝton dum **Universala Kongreso de Esperanto**. La tondra aplaŭdo de la gastoj montris, ke li elparolis la deziron de ĉiuj. Speciale li dankis al la organizintoj, al ges-oj Tolnai, al s-ano Balkanyi kaj al ĉiuj aliaj, kies nomojn la fremdlandanoj ne povis memori, sed kies amikecon ili forgesos neniam. Tuj post li parolis s-o Setälä ankaŭ proponante, ke en Budapeŝt estu internacia kongreso de Esperanto kaj samtempe memorigante pri la morto de fama finna poeto J. Aho, pro kies honoro la ĉeestantaro ekstaris.

S-ano Laquer demandis, ĉu li estis prava invitante la fremdulojn viziti Budapeŝton, kaj poste oni kantis la himnon, kiel komencen de kabaredeto, kiun aranĝis s-ano Andreo Hevesi, kiu jam dum la antaŭtaga teatra vespero amuze antaŭanoncis la pli gravajn numerojn. Deklamis d-ro Bano, Kalocsay, itala gasto d-ro Vaona kaj Baghy, fortepianludis Spiro kaj itala samideano Nildin Imperiale, s-ino Blaise dankis pro la helpo de la virinoj en la nomo de la virinoj allandaj dirante, ke ŝi nun komprenas, kial oni aŭdas en Budapeŝt tiel multe pri kiso, ĉar la samideanoj de Budapeŝt estas vere amindaj, kaj certe ĉiuj samideanoj tien venos, se ili tion ekscios.

La vespero finiĝis per dancado de la junularo, dume la gastoj iom post iom adiaŭis kaj foriris. Multaj tamen ne povis disiĝi kaj ankoraŭfoje kunvenis en alia kafejo por refreŝiĝo. Tie oni denove reciproke salutis unu la alian, la gastoj kaj la gastigantoj. Sed je tiu okazo s-ano Balkanyi rememorigis pri la granda laboro de la sennomaj, nekonataj organizintoj, kies merito estas la sukceso, krom la kunludantoj de la amuzvesperoj ankoraŭ la silente laborintaj gesamideanoj: Terinjo Tamas, la gazetraportantino, Stefano de Roboz, Jozefo de Mateffy, Ladislao Szentgyörgyi, kelkaj

membroj de la grupeto ERA kaj multaj aliaj, kiuj alportis siajn brikajn al la komuna konstruaĵo. Ni vere dubas, ĉu alia simila festeno povus sukcesi pli bele.

La gazetoj skribis pri la festenoj longajn artikolojn, kaj kelkajn gastojn ankoraŭ dum la du sekvantaj tagoj gvidadis la hungaraj samideanoj, kiuj ricevis per la sukceso certe plenan rekompenccon pro ilia modela laborado. Iom post lom forrulis la vagonaroj, forflugis la verdaj flagetoj, kaj la sunradiaj tagoj en belega Budapeŝt jam nur ŝajnis esti bela sonĝo. Sed ili ne estis sonĝo, kaj ili redonis al la partoprenintoj la esperon, ke oni povas ankoraŭ aranĝi varmajn, plenkorajn, samideanajn festojn en Esperantujo.

Korekto.

En ET n-o 45, paĝo 2, kolono 1, antaŭlasta allneo, oni bonvolu legi: „Tagmeze la esp. reprezentantoj de la foiroj de Barcelona, Paris, Lyon, Padova (anstataŭ Milano), Frankfurt kaj Basel kaj la redaktoroj . . .“

Votoj pri Ekskurso al Moravia Karsto.

Pri la ekskurso al Moravia Karsto ni ricevis diversajn alskribajojn plendajn kaj informajn, el kiuj ni represas du. Sed ni petegas la samideanojn, ke ili ne kreu disputon aŭ eĉ skandalon el la afero. Certe, la organizo de la ekskurso estis malbona; sed ĝi jam pasis, kaj ni ne plu ĉagrenu pri la jam ne ŝanĝeblaj malagrablaĵoj, kiujn ĝi estigis. Ĝi estu instrua averto por la aranĝantoj de la venontjara kongreso. — Prave lu leganto de nia gazeto petis nin, ke ni ne tro akre kritiku la ekskurson al Moravia Karsto, ke la grotaj estis vere mirigaj, ke li en la belegeco de la subtera miraklejo perdis sian koron, kaj ke li sincere bedaŭrus, se li ne estus partopreninta la ekskurson kaj per tio malhaviginta al si grandan nekompareblan ĝuon. — Ni estu kontentaj pri la neatendita sukceso de la XIII-a, ni ne kondamnu niajn ĉefajn samideanojn pro la ne bona funkcio de la malpli gravaj kongresaj aranĝoj kaj ne plu tuŝu, kio povus prezenti ĝermon de danĝero por la konkordo inter la esperantistoj.

Jen la unua artikolo sendita de brita samideano:

Mi legis kun multe da intereso la raporton pri la kongreso en ET. Mi bedaŭras, ke vi ne partoprenis la ekskurson al Moravia Karsto, ĉar tiuokaze vi povus raportiri pri la malbonaj aranĝoj. Post 7 horoj da vojaĝo ni alvenis Blanskon kaj vagadis tra la vilaĝo; neniu sciis, kion fari aŭ kie sin trovas la kavoj. Post longa atendo aperis aŭtomobilo (nur unu). Neniu sciigis la malriĉulojn, ke ili devis pagi 10 kr. en ĉiun direkton por sidloko en aŭtomobilo kaj 20 kr. por entro en la kavojn.

Alia artikolo deveninta de samideano en Brno:

Ekskurson aranĝis kongresa sekretario s-o Ptitik, ne respektante atencojn de samideanoj el Brno koncerne forveturon de rapidtrajno, kiu malgraŭ sia malfrua forveturo el Praha (7.40 h.) malfruigis pro nepardonebla enmiksado de nekompetentaj ekskursantoj. Subita pluvo plimbonigis mienon en Blansko, gastoj atake okupis aŭtomobilojn neniel observante konsilojn de memvolaj gvidantoj, ĉar neniu el aranĝanta kongresa komitato aperis. Anstataŭ 6 ŝtataj aŭtomobiloj aperis sole 2. La kongresa antaŭsciigo anoncis vojaĝelspezojn je 54 kr., sed por surprizo de

gastoj oni deziris pagon aparte pri aŭtovojaĝo kaj enirbileteto. Gravaj riproĉoj bedaŭrinde trafis oferemajn memvolulojn kaj liajn konsilojn. Neniu miru, ke multaj gastoj malsatis, kvankam lokaj restoracioj preparis 800 menuojn, el kiuj duono restis, kaj por vespermanĝo 800 saketojn kun tre delikata ŝinka miksaĵo (en stacidoma restoracio), kiun ankaŭ malatentis ekskursantoj, kaj el restoracioj forkuris muzikistoj ne trovinte eĉ iom da kompato de tro malfruigitaj kvankam fervore atendataj esperantistoj. Pri rememoro restis ĉarma gvidlibro: Moravia Karsto, kiun ĉiu samideano mendu ĉe Esperantista Klubo en Brno; prezo 1.50 fr. fk.

Granda Sukceso per kaj por Esperanto.

Pri la vizito de s-o Sevenhuijsen el Haarlem en Auerbach kaj pri la intencita projekto gastigi 400 germanajn infanojn por refreŝigo ĉe holandaj samideanoj ni ricevis ankoraŭ sekvantan detalan raporton:

S-o seminaria direktoro Sevenhuijsen el Haarlem, prezidanto de la Esp. Instruista Asocio Tutmonda, restadis kelkajn tagojn kun sia fillino ĉe s-o fabrikisto Hugo Gerisch en Auerbach en Vogtlando (Saksujo). Oni preparis la senpagan gastigon de 400 malfortaj infanoj el la distrikto Auerbach ĉe nederlandaj esperantistoj.

Dimanĉon, la 14-an de aŭgusto, okazis porinfana festo ĉe la paŝista societo kaj invito al Nederlando.

Lundon estis konferenco en hotelo „Braunes Ross“ (Bruna Ĉevalo), kiun ĉeestis inter aliaj registara konsilisto d-ro Schwerdtner kiel reprezentanto de la distriktestro, lerneja direktoro d-ro Puchta kiel anstataŭanto de l'urbestro, reallerneja direktoro d-ro Gröppel, supera studa konsilisto Nestler, prez. de la esp. grupo, lerneja direktoro Rohmelssen el Ellefeld, lernejestro Uhlrig el Auerbach-Mühlgrün, studa konsilisto d-ro Trögel de la seminario, studa kons. Gutwasser de l'komerca lernejo, ĉefredaktoro Gröger de „Auerbacher Zeitung“, prof. Hübsch de l' seminario kaj multaj instruistoj kaj membroj de la grupo. Oni parolis ekskluzive Esperante.

Mardon oni inspektis diversajn brodaĵofabrikojn, la seminarion (kie oni instruas Esperanton al la seminarianoj) kaj la kastelturon. Vespere estis kostumfesteto kun muzikaj prezentadoj en la dekoritaj salonoj de l' domo Gerisch.

Multaj verdaj standardoj kaj flagoj salutis la nederlandajn gastojn ĉe ilia alveno kaj dum ilia restado en Auerbach. Esperanto estas la aktuala temo de l' interparolado en Auerbach kaj ĉirkaŭaĵoj, ĉar ĉiuj vogtlandaj gazetoj de post 1912 raportadas ĉiusemajne pri la esp. movado.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Kiu helpos?

Esp. societo „Stelo“ en Kirdjali, iam turka kaj nun bulgara urbo, iniciatis kun aliaj kulturaj societoj de la urbo la konstruon de teatra salono kun legejo; ĉar sub la regado de la turkoj la urbo restis kulture tre malprogresanta. La salono, kiun oni jam komencis konstrui, kaj kiu estos finkonstruita post tri monatoj, kostos 250 000 frankojn, sed la monsumo, pri kiu oni disponas, estas tre malgranda. Kiu do volas subteni la gravan kulturalan entreprenon, sendu monsumojn al s-o Vasil Vačev Tenčev, prez. de societo „Stelo“, Tabakeksportejo „Tahandag“, Kirdjali, Bulgario.

Laŭ la konduto de Hopkins Mateo konjektis, ke li estas policano. Ĉi tiu penso alkondukis la alian. Mateo rememoris, ke lia pasporto restis en la loĝejo de Bork. . . Kaj ĉar li ne sciis, ke en tiu lando oni eĉ ne tute bone komprenas, kio estas pasporto, li ektemis. Komence li iomete formoviĝis malantaŭen, poste faris kelkajn grandajn paŝojn en la sama direkto, fine li, laŭ rusa esprimo „metis la piedojn post la zono“ kaj ekkuregis returnen, ne rigardante post si. Kun dolora penso en la kapo, ke nun li fariĝis senpasporta vagulo, li sin enmiksitis en la densan homamason de Broadway.

XVIII.

Ĉi tie ankoraŭ unufoje la Loziŝĉanon karesis la espero. Kiam li trapasis la homplenan straton, li tuŝetis lian manon delikate kaj afable. Apud li staris negro kaj ion al li parolis, montrante per la mano la seĝon, starantan sur la trotuaro. Nigra, brilanta vizaĝo, ruĝaj lipoj, blankaj okulskleroj kaj krispaj haroj de la negro ŝajnis al Mateo preskaŭ konataj. Li pensis, ke eble la negro estas unu el tiuj sentaŭguloj, kiuj atakadis lin sur la strato en lia unua tago en Nov-Jorko. Sed kion nun deziras tiu negro? Eble, li rekonis Mateon, eble li konas Dima'n kaj Bork'on, eble li sciis, ke ili lin serĉas en la tuta urbo, kaj li nun proponas, ke Mateo atendu ĉi tie, dum li sendos lun por informi lian kamaradon. Efektive, la negro, vidante, ke Mateo deziras sidiĝi sur lian seĝon, diris ion al sia knabo, kaj tiu len kuris. — Sendube, li venigos Dima'n kaj s-on Bork.

Mateo ĝojplena sidiĝis kaj salutis la negron per kapmovo. La vizaĝo de la nigrulo nun tre plaĉis al li: mildaj, malgajaj okuloj, dikaj lipoj, atestantaj pri bonkoreco. Vere, ne bela li estis kaj nigra, tamen afabra kaj servema. Li okulsignis al Mateo, kaŭris ĉe liaj piedoj kaj volis intertempe

La Centjarmefesto de la Sendependeco de Brazilio kaj Esperanto.

La prezidanto de „Brazilia Ligo Esperantista“ ricevis de la ĝenerala direktoro de l' oficiala oficejo de la Centjarmefesto de l' Sendependeco de Brazilio jenan oficialan leteron:

Nr. 324.

La 6-an de julio 1921.

Al sinjoro

d-ro Alberto Couto Fernandes, prezidanto de Brazilia Ligo Esperantista.

Dezirante iniciati eksterlande intensan kaj efikan propagandon de la Centjarmefesto de l' Sendependeco de Brazilio kun la celo venigi alilandulojn kaj kunhelpi la disvastigon de la ekonomiaj riĉaĵoj kaj de ĉiuspecaj eblecoj prezentataj de nia lando, decidis la Agada Komitato de l' Centjarmefesto utiligi la rimedojn, kiujn prezentas la internacia lingvo Esperanto.

Tiu ĉi Oficiala Oficejo jam ricevis multnombrajn informpetojn esperante skribitajn kaj faritajn de industriaj kaj komercaj firmoj, ĉiusepecaj asocioj, gazetoj kaj privatuloj.

Ni havas ankaŭ multajn programojn kaj prospektojn en Esperanto pri la internaciaj foiroj kaj Ekspozicioj lastatempe en diversaj eŭropaj landoj.

Sekvante tiun ekzemplon, kaj ankaŭ por plenumi tiujn petojn, deziras la Agada Komitato komisi tiun Ligon por traduki esperantan ĝlan ĝeneralan programon de la memorigaj festoj, la regularon de la Ekspozicio kaj la prospektojn, kiujn tiu ĉi Oficejo al vi transdonos.

Antonio Pinto de Almeida, ĝenerala direktoro.

Ĉiu, kiu deziras ricevi informojn kaj prospektojn pri la Centjarmefesto, tuj skribu al la Agada Komitato laŭ la jena adreso: Commissao Executiva do Centenario, Bibliotheca Nacional, Rio de Janeiro, Brazilio.

Jubileo de Devjatin.

Prezidanto de la Petrograda Societo „Espero“, prof. de Esperanto kaj membro de L. K., s-ano Vasilij Nikolaevič Devjatnin festis la 14-an de julio la 30-an datrevenon de sia agado por Esperanto.

La unua oficiale aprobata esp. lernolibro.

La esp. lernolibro „Die Völkersprache Esperanto“ de prof. J. Süsler en Saaz ricevis la oficialan aprobon por germanaj mezaĵaj burĝaj lernejoj en Ĉenoslovakio (Ordono de la instruada ministerio de 26. julio 1921, Z. 67. 262).

Propaganda tago de esp. grupo Koblenz.

La esp. grupo Koblenz aranĝos la 4-an de septembro en Koblenz gravan esp. propagandotagon kun varbo-parolado, ekspozicio, teatraĵo, koncerto, sol- kaj ĥorkantoj kaj dancado, al kiu ĝi kore invitas ĉiujn gesamideanojn de la ĉirkaŭaĵo. Detalajn sciigojn donas laŭ deziro la sekretario L. Funken, Florinsmarkt 7 a.

Esperanto en Polio.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

BYDGOSZCZ. La ĉi-tlea Germana Komerca Lernejo alprenis Esperanton kiel nedevigan instru-fakon. — La Aŭtodidakta Universitato, gvidanto s-o Chmielewski, Bydgoszcz, ul. Kordeckiego 1a, uzas por la korespondado kun la eksterlando sole Esperanton. Ĉe la ĵus nomita instituto estas starigita esp. fako, kaj oni petas alsendi esp. librojn, gazetojn ktp. — La kunveno de la kat. esp. grupo „Antaŭen kun kredo“ la 11. julio estis dediĉita al

diri liajn botojn. Mateo komence kontraŭstaris, poste li pensis, ke en la mondo ekzistas diversaj kutimoj, kaj ke la negro povus ofendiĝi. Tial li konsentis submetiĝi al la deziro de la bonulo, tiom pli ke liaj botoj efektive fariĝis jam tute flavgrizaj pro la vojaĝo. La negro serveme frotadis la botojn de Mateo per brosoj, ŝmirante ilin per ciro, surkraĉante kaj ree frotante. Kvin minutojn poste la botoj fariĝis kiel spegulo. Mateo dankis per kapmovo kaj ree pli oportune sidiĝis, sed la negro tuŝetis lian manikon kaj per la dika fingro montris sian manplaton. Mateo komprenis, ke la negro petas pri „trinkmono“, levigis de l' seĝo kaj palpeserĉis en sia poŝo.

„Ĉi estas meritita“, li diris voĉe: „certe, meritita! Por tia servo mi ne scias, kion mi estus preta doni al la bonulo!“

Kaj li elfiris el la poŝo du monerojn. La negro prenis unu.

„Prenu ankoraŭ“, diris Mateo bonanime. — La negro skuis la kapon.

„Kia honesta popolo!“ pensis Mateo kaj volis ree sidiĝi sur la seĝon, sed li sinjoro jam okupis ĝin, sammomente la alkurinta knabo alportis al la negro kruĉon da biero. La negro trinkis la bieron, dum la knabo komencis diri la botojn de la sidanta sinjoro. La haroj de Mateo hirtigis sub lia ĉapo.

„Sed kie do estas Dima, Bork?“ li demandis la negron.

La negro turnis la kapon, alrigardis Mateon kaj montris liajn botojn, dirante:

„Well!“

„Well?“ Mateo rememoris la klarigon de Dima, ke tiu vorto signifas „bone“. Kion do bonan la viro estas farinta? Ha, malbenito! Li diras, ke li bone ciris miajn botojn. Kaj nenion pli li volis fori por mi?

(Daŭrigota.)

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 6-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(61-a daŭrigo.)

En tiu sama momento la placon trakuris la sama rapidema raportisto. Li haltis, rapide desegnigis apud la antaŭa figuro de la Loziŝĉano la figuron de s-ro Hopkins kun du sovaĝuletoj en la manoj kaj aldonis la subskribon: „La policano Hopkins klarigis al la sovaĝulo, ke la banado de infanoj en la urabaj fontanoj estas kontraŭ la leĝoj de la lando“.

Poste, enŝovinte la notlibreton en sian poŝon, li flugrapide sin jetis al la fervoja vagono, por ĝustatempe alveni al brulo. En lia kapo naskiĝis jam plano de nova noteto: — Oni scias, ke nia urbeĝo, la plej granda en la mondo, allogas homojn el plej malproksimaj partoj de la mondo. En la lastaj tagoj ni havis la okazon vidi, kiel unu el tiuj sovaĝuloj . . .

La vagono forveturigis la talentan viron kune kun lia komencita noteto, kaj s-o Hopkins starigis la knabojn sur la pavimon, regalis ĉiun per malforta frapo, ĉe aprobanta rido de la preferasantoj, kaj poste sin turnis al la fremdulo. Eble s-o Hopkins sukcesus pli bone sciigi pri la naci-eco de la alilandulo kaj ricevi de li respondon je la demando: „Kiel plaĉas al vi ĉi tiu lando?“ Eble Mateo en la sama vespero povus ĉirkaŭpreni Dima'n, kiu kune kun Paddy tiun tutan tagon serĉadis lin tra la tuta urbo, se . . . dum Hopkins sin okupis je la knaboj, la Loziŝĉano ne estus malaperinta . . .

la memoro de nia kara mortinta poeto Antoni Grabovski, pri kies morto raportis Volkszeitung, Gazeta Gdanska, Posner N. Nachrichten, Neue Lodzer Zeitung, Cios Polski k. a.

LODZ. Interne de L. E. S. fondiĝis du sekcioj: debata sekcio kaj sekcio de pomonumenta kolektado. Aparte de supre nomita societo malfermiĝis dua, filio de „Pola Esp. Societo en Varsovio“. Dank' al klopodoj de s-ano Lejzerowicz la agentejo de filmo-eksploatada societo (adr. I. Bernheim, Lodz, Zawadzka 17) akceptis Esperanton kiel helplingvon.

POZNAN. La 8. julio okazis monata kunveno de ĉi-tiea Pola Esp. Societo. S-o Barkowski faris interesan paroladon pri la esp. kongresoj. Al XIII-a oni delegis s-on Kallitzke. Paroladis d-ro Grossstück kaj gastis s-ano Edmund Fethke el Bydgoszcz.

TUREK. Post sukcesplena parolado, farita en junio de prof. Kronenberg, okazas nun daŭre bone vizitata kurso, gvidata de s-ano Strelczyk.

VARSOVIO. Ĉi tie ekzistas nun du publikaj esp. oficejoj.

Prengel, gvid. de PES.

La sukcesoj de „Konkordo“.

La antaŭ nelonge fondita esp. rondo „Konkordo“ en Varsovio jam sukcesigis koncentrigi la idealistan esperantistaron de Varsovio, Polujo kaj eksterlando. Per la granda propaganda prelego de prof. Charles Richet kun partopreno de prof. Baudouin de Courtenay kaj Leo Belmont ĝi tuŝis la indiferentan kaj obstinan silenton de la gazetaro. Lastatempe „Konkordo“ altiris la atenton de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, kiu invitis la reprezentantaron de „Konkordo“ por preparoli la staton de Esperanto en Varsovio kaj eventualan aranĝon de Universala Esp. Kongreso en Varsovio. Ĝi ankaŭ instigis la saman ministerion sendi oficialan delegiton al la Praha kongreso, ktp. En Varsovio oni jam elpendigis en pli ol dudek magazenaĵ fenestroj presitajn ŝildojn de „Konkordo“, ke tie ĉi oni povas informiĝi pri internacia lingvo Esperanto; en la magazenoj troviĝas konvenaj informiloj, en kiuj ĉiu samideano povas trovi pole kaj esperante sciligojn pri Esperanto kaj esp. movado en Varsovio.

Alvoko al polaj geesperantistoj!

Post kelkajara silentado la polaj esperantistoj nun denove komencis labori fervore. En multaj urboj jam estas societoj kaj esp. kursoj, sed unu mankas — P. E. A. (Pola Esperanta Asocio). Preskaŭ ĉiuj landoj jam havas landasociojn, ĉiujarajn landkongresojn ktp.

Polaj geesperantistoj! Zamenhoflandanoj! Kial vi silentas? Intensigu ĉiujn eblajn fortojn! Organizu P. E. A., kaj ankorau en 1921 devas esti aranĝata la unua pola esp. kongreso, kaj ne forgesu zorgi pri organo!

Miedzyrzec (Polio). H. Brukarz, del. UEA.

Fervojo.

Fervoja konferenco en Praha.

Dum la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto okazis la 2. aŭg. 1921 nia fakkunveno, kiu ĉeestis 27 diverslandaj gefervojistoj. Malfermis ĝin f-ino S. Dlouhá el Praha post la 9-a a. t. Laŭ ŝia raporto anoncis sin 37 fervojistoj. Plue ŝi rimarkis, ke pro okupo de ĉiutagaĵ laboroj kiel komitatano de L. K. K. ŝi ne pli sukcesis ol konservi interrilatojn kun la plej viglaj fervojistoj en Germanio kaj Ĉeĥoslovakio. Laŭ kutimo estis elektita la kunvenestraro, s-oj: prez. G. Habellok, sekr. Jozef Blazek. S-o prezidanto proponas la programon: 1. Raporto de ĉiulandaj delegitoj pri ĝisnuna fervoja movado esperantista; 2. Estas necese, refondi la Internacian Asocion de Esperantistaj Fervojistoj, ev. kun fakgazeto; 3. Aranĝo koncerne konstruadon de faka vortaro (fervojterminaro). Al tiu ĉi programo anoncis sin kiel parolantoj ges-oj: por Aŭstrio: Hugo Steinhauer (Wien), por Germanio: G. Habellok (Breslau), por Ĉeĥoslovakio: Joz. Blazek (Olomouc) kaj S. Dlouhá (Praha), por Nederlando: J. W. F. Poolen (Rotterdam) kaj por Svedio: G. Hedström (Gefle). Gravajn konsiliojn donis al la kreota asocio s-o Hans Jacob, ĝen. sekr. de UEA, kiu estis invitita kaj per sia ĉeesto honoris la fervojkunsidon. En la komitato de I. A. de E. Fervojistoj estis elektitaj s-oj: prez. Georg Habellok, inspektoro, (Breslau); vicprez. Adolf Kašpárek, ĉefrev. (Praha); sekr. Jozef Blazek, inspektoro, (Olomouc) kaj kas. Emanuel Kubásek, adj., (Pizen). Proviz. jarkofizo: 5 kĉ.

Jozef Blazek, ferv. inspektoro

sekretario,

Olomouc, Müllerstr. 266, Ĉeĥoslovakio.

Recenzelo.

GAZETOJ.

KATALUNA ESPERANTISTO. Aŭg.

30 paĝoj kaj kovrilto, kun bona enhavo. Programo de la IX-a Kongreso de Kataluna Esp. Federacio en Girona (15-17. okt.).

THE BRITISH ESPERANTIST. Aŭg.

Ankaŭ tiu ĉi gazeto, lam diketa kaj bonenhava, pro la malfavoraj ĉirkonstancoj pli kaj pli maldikiĝas. Jen numero de nur 8 paĝoj! Eble estos konsilinde forlasi la ĝisnunan sistemon, laŭ kiu ĉiu membro de BEA ricevas senpage (!) la gazeton.

LA SEMISTO. Majo-julio.

L'ESPERANTO. Julio.

Interesa revuo kun aldono: La Pesto en Milano dum 1630.

ĈEĤOSLOVAKA GAZETO, kun NOVA EŪROPO. 30. Julio.

La dua numero de tiu nova gazeto estas inda sekvo de la unua, kiun ni jam recenzis. Sur 14 paĝoj ĝi enhavas artikolojn speciale interesajn pro la kongreso de Praha. Kiel la unua, ankaŭ la dua numero aspektas serioze pro la multaj anoncoj.

HUNGARA ESPERANTISTO Julio-aŭg.

Enhavas belegan poemon de Julio Baghy „Siberia Lulkanto“.

ESPERO KATOLIKA. Junio.

Ni tre miras pri presita letero de d-ro Smulders pro IKUE kaj Ika. Kio okazas en la katolika esp. movado?

KOMUNIST-ESPERANTISTO. Julio.

Unua numero eldonata de Komunista Esp. Grupo „Progreso“ en Lisboa, Portugalio, R. Arco Marquez d'Alegrete, 30 - 2. D.

DER ARBEITER-ESPERANTIST. (La Laborista Esperantisto.) Aŭgusto. Organo de la Germana Lab. Esp. Asocio, Hannover, Astenstr. 36.

LA ESPERO. Junio.

Jam nur kvarpaĝa. Raportas, ke dum la lastaj 4 semajnoj aperis en la sveda gazetaro 80 artikoloj pri Esperanto kaj 6 pri Ido.

LA ESPERO. Julio-aŭg.

Kun listo de la svedaj kongresanoj por Praha.

ITALA ESPERANTISTO. Junio.

Kun kelkaj ilustraĵoj.

LA MARTO. Julio-aŭg.

Pli ampleksa kaj pli interesa ol la ĝisnunaj numeroj. Ilustraĵoj pri Reichenberg.

LA PROGRESO. Julio. (Kongresa numero.)

12-paĝa, kun ilustr. artikoloj pri Praha kaj Pizen, kaj kun muziknotoj de kanto „Nur antaŭen“.

NEDERLAND-ESPERANTO. N-oj 140-147 (Junio kaj Julio).

En nederlanda lingvo kaj Esperanto. Aperas semajne.

LA EKLEZIA REVUO. Julio-sept. Adreso: Farnley Tyas

Vicarage, Huddersfield, Angl.

AGITANTO. Julio.

Nova organo de Kronstadt'a grupo de Sovjetlanda Esp. Unuigo. Adreso: Visokaja ul. 27, loĝ. 2, Kronstadt, Rusal.

LIBROJ.

LA KOBOLDO ONDRA. De Jiri Mahen. El moderna ĉsl.

literaturo trad. Esp. Rondeto en Olomouc. Havebla ĉe Jar. Mastny, komercisto, Olomouc, Ĉeĥoslov. Formato 10 1/2 : 14 cm. 40 pĝ. kaj kovrilto. Prezo afr. 4.50 kĉ, 8 germ. mk. aŭ 4 resp.-kup.

ESPERANTO. Lernolibro kun vortaro por ĉeĥoslovakoj,

de Julie Šupichova. Eldonejo Solc & Šlmaček en Praha. 11 : 18 cm. 116 pĝ. kaj kovrilto. Prezo ne montrita.

DEKDUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO,

Hago, 8-15. aŭgusto 1920. — Kajero tridek-unua de la Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj ktp. aferoj. Eldonis Esp. Centra Oficejo, Paris, 51 rue de Clichy, 1921. — 115 pĝ., 16 : 24 cm. Prezo: verde broŝurite 3 fr. fk.

Jus aperis la oficiala dokumentaro de la XII-a Kongreso en Hago. La libro enhavas 1. la preparajn dokumentojn, 2. la oficialan protokolaron, 3. aldonojn al la protokolaro, 4. la liston de la kongresanoj, 5. detalajn raportojn pri la fakaj kunvenoj kaj 6. priskribon de la festoj kaj ekakursoj okazintaj dum la kongreso. — S-ino E. F. Cense, la sekretarino de la Esp. Centra Oficejo kaj de la kongreso mem, tre zorge kompilis la dokumentaron. Ĝi interesos precipe tiujn, kiuj ĉeestis la kongreson, sed ankaŭ tiujn, kiuj volas informi sin pri ĉiuj laboroj, paroladoj kaj proponoj, kiujn oni faris en Hago. (G. Ajul.)

ESPERANTO-LEITFADEN, mit Sprechübungen. Anhang: Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Verkita de instruisto Taubmann. 120 pĝ. Eldonejo „La Marto“, Haida, Ĉeĥoslovakio. Prezo bone kartonite 14 ĉ. kronojn.

Jen antaŭ ni nova lernolibro de la konata german-bohema samideano, kiun ni senakruple povas rekomendi al la kursgvidantoj. Por meminstruado mi ĝin malpli rekomendas, ĉar abundaj klarigoj ne estas en ĝi. Por kursestro do estas inda okazo fari el la preciza skeleto de la mallongaj reguloj en la lernolibro de Taubmann la admirindan konstruaĵon de nia kara lingvo. — Preserarojn mi ne trovis. Sed mi konsilas al la verkinto forigi kelkajn erarojn kaj malbelaĵojn en la venonta eldono de ĉi tiu lernolibro, ekz. p. 45 „ĝustitempe“ anst. „ĝustatempe“, „kara“ anst. „multekosta“, p. 47 kaj 48 „Ilmigantaj“ kaj „starantaj“ anst. „Ilmigantajn“ kaj „starantajn“, p. 49 „boviro“ anst. „bovoviro“. (G. Ajul.)

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represigi en naciaj jurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1—2 ekzemplerojn de la koncerna jurnalo al la redakcio de ET.)

LETERO EL ESTONIO.

Tallinn, aŭg. 1921.

La estona klerministrio difinis por la lernojaro 1921/22 en ĉiuj elementaj lernejoj jenan instruoplanon:

Por la klasoj (lernojaroj):	1.	2.	3.	4.	5.	6.
1. Gepatra lingvo	6	6	6	5	4	4
2. Geografio kaj historio de Estonio	3	3	3	—	—	—
3. Matematiko (aritmetiko, geometrio, algebro)	5	5	5	5	5	5
4. Natursciencoj (biologio, fiziko, mineralogio, ĥimio)	—	—	—	4	4	5
5. Geografio (elementaj kosmografio, geografio, etnologio)	—	—	—	2	2	2
6. Historio	—	—	—	2	2	2
7. Elementoj de la civitaj sciencoj (sociologio; rajtoj, devoj kaj etiko de la civitano)	—	—	—	—	—	1
8. Unua fremda lingvo	—	—	—	4	4	3
9. Dua fremda lingvo	—	—	—	—	—	3
10. Desegnado	2	2	2	2	2	2
11. Manlaborado	2	2	2	2	2	2
12. Kantado	2	2	2	2	2	2
13. Gimnastiko	2	2	2	2	2	2

En tiu ĉi plano, laŭ kiu la estoniano devige instruas siajn infanojn, sur la ĉefa loko troviĝas la gepatra lingvo, la lingvo, kiu estas uzata hejme. Ĉar en Estonio apud 85,2% da estonoj loĝas ankaŭ 6,3% rusoj, 5,4% germanoj, 1,9% hebreej, 2,4% latvoj kaj 0,8% alinacianoj*), tial en parto de la lernejoj kiel ĉefa lingvo estas instruita la germana, rusa, eĉ sveda. Kiel unuan fremdan lingvon en tiaj lernejoj oni instruas la estonan,

dum en de estonaj geknaboj vizitataj lernejoj sur la loko de „unua fremdlingvo“ troviĝas la germana, rusa aŭ angla. En ambaŭ specoj de lernejoj kiel „duan fremdan lingvon“ oni praktikas la anglan, germanan aŭ rusan.

Plue, oni rimarkas, ke la religiinstruado mankas en la plano: ĝi estas foriglita pro postuloj de la nuntempa pedagogiko, laŭ la pasintjara decido de la Estonia Konstituantaro malpermesinta ian ajn devigan instruadon pri religio en la lernejoj de Estonio.

H. Sakarias.

*) Ni citas laŭ ĉi-jara statistiko de la urbaj loĝantaroj en Estonio. La kamparo estas preskaŭ tute loĝata de estonoj, esceptite la insuloj Moon kaj Vorms, kiujn loĝas kelkmiloj da svedoj.

La maljuna cigano.

*Mihaelo Vörösmarty *).*

He cigan', vi trinkis pagon, ludu!
Krupendado vana havu finon!
Kion taŭgas zorg' ĉe akvo-pano,
En rigidan glason verŝu vinon!
Viv' en mondo ĉiam jena estis:
Jen ĝi frostis, jen flamante festis.
Ludu! Eble baldaŭ mortos ton',
Arĉ' ŝirita iĝos nur baston';
Vin' en glaso, malĝojeg' en koro
Ludu, kaj ne zorgu pro l' doloro!

Via sango bolu torent-ŝaŭme,
Via cerb' ektruenu en kranio,
Komefflame brulu la okuloj,
Sonu kordoj, pli ol ventokrio,
Kaj malmole, kiel hajlo kruda:
Grenokampoj iĝis tero nuda!
Ludu . . .

Lernu kanton de l' venteg' krlanta,
Kiu veas, muĝas, hurle bruas,
Vivon murdas, homon, beston buĉas,
Arbojn, ŝipojn ŝiras kaj detruas;
Jen milito en la mondo granda,
Tremas dia tombo Sanktalanda.
Ludu . . .

Kies ĝemo subpremata sonis?
En sovaĝa flug' jen kri' suferaj!
Kiu frapas tondre firmamenton,
Muĝas kiel muellil' infera?
Mens' freneza? Anĝelfal' Korkrevoj?
Trup' venkita? Troaŭdaca; revoj?
Ludu . . .

Kvazaŭ nun reaŭdus ni Adamon
En dezert' kun febre-ĝemaj vortoj,
Bastonfrapon de l' fratmortiganto,
Tomboplendon de l' unuaj orfoj,
Kun flugiloj muĝaj la vulturon,
La senmortan Promete-torturon.
Ludu . . .

Stelo blinda: la mizera tero
Turnu sin en suk' maldolĉa sia,
Kaj de pekoj, malpuraĵ', filmeroj
Ĝi putiĝu en venteg' furia.
Bark' de Noa venu sur la ondo,
En si kun pli bela, nova mondo.
Ludu . . .

Ludu . . . ! Sed ne . . . lasu nun la kordon,
Estos foje festi' en mondo-valoj;
Se laciĝis la venteg'-kolero,
La malpac' elsangis en bataloj,
Tiam ludu ardaĵn melodiojn
Ekstazante, ekravante dionj!
Tiam kapu l' arĉon via man',
Sereniĝu via frun', cigan'!
Vin' de l' ĝoj' plenigu vian koron!
Ludu . . . forgesinte mond-doloron!

Trad. D-ro Kolomano de Kalocsay.

*) Unu el la plej famaj hungaraj poetoj (1800-1885). Tiu ĉi poemo estas voko de hungaro al la cigano malesperiginta pro malfeliĉa sorto de la lando.

La 3-an de aŭgusto mortis en urbo
Staultal en Litovio la loka delegito de UEA

S-o Litevko Vicente.

La enterigo estis la 4-an de aŭgusto. Kvankam la mortinto estis laboristo, kiu ĉiam estis okupata je aferoj, li ĉiam trovis tempon por la divastigo de Esperanto. Dank' al li en la loka litova gimnazio estas malfermitaj esp. kursoj, kiujn vizitis multaj gimnazianoj. Ankaŭ dank' al li, kiu donacis sian tutan esperantajn je la kursoj, funkcias la biblioteko.

La morto de s-o Litevko ĉagrenis la junajn lokajn esperantistojn, kiuj nuntempe tre bezonas lin. Ili kuŝigis sur lian tombon la vivfloran kronon, kies rubandoj havas la surskribon: Samideano, vi mortis, sed via esperanta animo vivas.

La provizora delegito, s-o Alsejko, enŝovis en la tombon la verdan standardon kun la verda stelo sur la blanka fono.

Ripozu kviete, kara samideano, via necesa laboro estos daŭrigata de viaj lernantoj.

J. Mudskij.

5a Internacia Foiro de Frankfurt m.



25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.

Importo. 30 branĉoj. Eksporto.



Presaĵoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo“ kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komercadoj“ en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt m. Germ.

Anoncetoj.

DANKO. Al Mexin kore dankas ĉiujn, kiuj sendis al si rakontetojn el sia lando. Se iu deziras ricevi la libron „Unua Paŝoj“, li skribu al ŝi sian adreson. — Al Mexin, del. UEA, Montreux, Svis., 63 Grand'Rue.

FILATELISTOJ. En Kovno (Litovio) fondiĝis nova filatelista societo: „La verda stelo“. La celo de tiu nova societo estas ebligi al ĉiuj membroj la interŝanĝon de ĉiuspecaj objektoj, kiel poŝtmarkoj, poŝtkartoj, bildoj, papermonoj ktp. Se vi deziras aliĝi, bonvolu sendi vian adreson kaj jarkontribuon (20 germ. mk.) laŭ la adreso: Kovno, Litovio, Kleistulo n-o 57, al s-o Leono Girgu.

MALNOVA NUMERO DE ET. S-o A. B. Durocher, 297, Workman Street, Montreal, Kanadio, deziras aĉeti n-on 2 de ET. Kiom vi postulas?

LEDA INDUSTRIO. Franca gazeto de leda industrio „Le Cuir“ (La Ledo) dezirante enkonduki en sia eksporta eldono: „La Indekso de ledaj industrioj“ fakon en Esperanto, petas ĉiujn esperantistojn interesigantajn pri la leda komerco aŭ industrio, kiel teknikistojn, komercistojn aŭ oficistojn, sendi sian adreson kun indiko de la profesio al s-o ĉefredaktoro de „Le Cuir“, 54 rue de Bondy, Parizo 10.

FOTOJ DE LA DEKTRIA. Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne havas la fotografadojn de la XIII-a Kongreso en Praha, povas ilin ricevi en jenaj specoj: 1. Malferma kunsido en poŝtkarta formato 5 kĉ., en pli granda formato 12 kĉ., 2. Grupo de fremduloj 12 kĉ., 3. Granda grupo de kongresanoj (ĉe la preĝejo) 12 kĉ., malpli granda 7 kĉ. Jan B. Vlach, Praha I, Narodni 38.

ĤEMIO. S-o Nikola Nedeltschew, studento, Wienerstr. 60, Darmstadt, Germ., serĉas ĥemilistajn gekorespondantojn. Interŝanĝas bonvolente kun gesamideanoj ilustritajn poŝtkartojn.

KIU SAMIDEANO povus prizorgi al mi okupadon en fremdlando? Mi finis antaŭ 11 jaroj komercan akademion, havas de tiu tempo bank- kaj fabrikpraktikon (el tio 4 jarojn en Rusujo), parolas boheme, esperante, germane, ruse, parte angle kaj pole. Afabla proponoj je adreso: Vilém Černý, bankoficisto, Trebechovice, ĉe Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Otto Charvat, fervoja oficisto, interŝanĝas poŝtkartojn ilustritajn (bildfl.) kun ĉiuj landoj. Adreso: Trnava, stacidomo-nadraŝi, Ĉeĥoslovakio.

Hungario, Miskolc, Szemere 27, s-o Lichtmann Nandor, studento, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Termezuristo deziras korespondi kun alilandaj samfakanoj pri la demando de sia profesio, kun aliaj pri diversaj ideoj. Ljudas Aiselka, Šiauliai, Pasadna 19, Litovio.

F-ino Bronė Zemackaitė, Šiauliai, Zemes Ukio Skirius, Litovio, interŝanĝas per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.)

S-o Kazis Juozapavičius, 15-jara gimnaziano, korespondas per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.). Adreso per Ljudas Aiselka, Šiauliai, Pasadna 19, Litovio.

Mi deziras ricevi detalajn sciigojn pri ĉiuj ekzistantaj terkulturai kolonioj, moralaj kaj religiaj komunumoj, kiuj celas helpi al morala kaj materiala bonstato de l' homo. Sciigoj estas dezirataj el la tuta mondo. Adreso: B. Duda, Litovujo, Subačius, Maksvyčiu Sodz.

Guiman Gittel, Jonava, Senojn g. 24, Litovio, deziras korespondi per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr., poŝtmarkoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Johanna Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.) nur kun fraŭlinoj.

S-o J. Lahtiharju, ad. Mieto, Polvi, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj.

S-ino Hilja Valve, Kausala, Radonsuu, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn de vidindaĵoj kaj pejzaĝoj.

Manuelo Palomera, Cardenal Casanas 10, Barcelona, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj kun la tuta mondo.

S-o Capton, 45 rue Vaneau, Paris, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Nikolao Ivanov, 110 Puškinskaja, Barnaul, Siberio, deziras korespondi per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr., leteroj, interŝanĝi poŝtmarkojn kaj esperantajn. Temoj: Nacia vivo, muziko kaj progreso de Esperanto.

C. Fujima, ĉe Bogahuro, 95, Genbei, Pocuka, Tokio Fu., Japanio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

N. Vigodakij, planludanto, studento de l' supera klaso en Konservatorio, deziras serioze korespondi kun ĉiulandaj, precipe germanaj samprofesianoj pri diversaj problemoj planismaj kaj komunmuzikaj (esperante, ruse kaj germane). Adreso: Tiflis, Georgio, Konservatorio, Gribojedovskaja 8.

S-o W. Kaminski, Bydgoszcz (Polujo), Bocianowo 24, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. bildfl.

Dankante al ĉiuj miaj gekorespondantoj mi sciigas ilin, ke pro la tro altaj poŝtelspezoj (k. 12 pmk., l. 20 pmk.) mi bedaŭrinde ne povas plu korespondi. S-o G. Tichocki, Bydgoszcz (Polujo), Zokietka 8 c II.

Triesto (Italujo). S-o Camuffo Armando, placo G. B. Vico 9/II, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun gejunuloj.

KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspecajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste. Uzu niajn servojn!

7a Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro

4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.



Teksajoj, ledajoj, ŝuoj, ornamaĵoj kaj armetiaj objektoj, meblaro, pormastrumad-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperajoj, kontor-uzajaro, manĝaĵoj kaj ĝuaĵoj, kemiaj- teknikaj artikloj.

Informojn donas:

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.
ESPERANTO-FAKO BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.

Franco

kun bonaj referencoj komercaj deziras
reprezenti en Paris
eksterlandajn firmojn pri ĉiuj
komercadoj

kaj produktoj. Donos komercajn informojn pri francaj komercadoj. Perfektaj diskreteco kaj honesteco.

Adresu ĉion al

S-o Emile Béchet
28, rue Leroyer, Vincennes (Paris).

Tradukojn (prefereble mallongajn) el la plej famaj naciaj poetoj kaj verkistoj interŝanĝas kun ĉiuj krom Anglujo, Ameriko, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Portugalujo Luigi Puppo, Via del Bragone 1-3, Genova, Sturla, Italio.

S-o Josef Bierbauer, Sinabelkirchen ap. Gleisdorf, Stirio (Aŭstr.), deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe kun komercistoj.

Freiberg, Sa., Germanujo. — 3 sinjoroj deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Skribu al P. Glöckner, instruisto, Mühlweg 29.

Mi deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per leteroj, ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Joseph Düllmann, Hagen i. W., Germ., Körnerstr. 73.

Reichenbach bei Grossvoigtsberg i. Sa., Germ., s-o Otto Heymann, deziras korespondi kun eksterlandanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Korespondon per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj deziras s-o Lois Bauer, oficisto, Ichendorf Bez. Köln, (Germ.), Glashütte.

Goswin Wisse, Hagen i. W., Böhmerstr. 45, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn ktp. kun samideanoj en la tuta mondo.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Kiu sendos al mi 50-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same ilom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfert, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu esperantisto.

Presita sur arta papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografadoj.

(Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo de la verketo 15 germ. mk.
Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“,
Köln-Horrem.

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun Inter-
rilatoj en ĉiuj landoj.

Akia kapitalo kaj rezervofondoj: hung.
kr. 9000000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr,
Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Poz-
sony, Satoraljaujhely, Szabadka, Temesvar.

Komerce-teknika domo

M. Kutaszek, Varsovio (Pol.)
Nowy Swiat n-o 26

serĉas reprezentadon aŭ „per cassa“ de maŝinoj por refari (prilabori) la lignon kaj metalon, krom tio ĝi serĉas reprezentadon de ŝtalo, motoroj, armaturoj por gaso, akvo kaj aliaj teknikaj artikloj.

Vendado pogranda. Bonaj referencoj.

Nur seriozaj firmoj, volantaj vendi siajn artiklojn en nia lando, estas petataj respondi.

Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

Castellina Marmoro
(Alabastro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj por elektra iluminado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preparataj. Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Oni korespondas en Esperanto.

**Ne forgesu helpi al
„Esperanta Ligilo“!**